

ESPERANTA FINNLANDO

1959

N:o 8

INFORMILO DE FINNLANDAJ ESPERANTO-ORGANIZAĴOJ

JARKOLEKTO 1959 — 9 numeroj

A b o n p r e z o enlanda 300 mk
eksterlanda 450 mk
aŭ 12 respondkuponoj

Bonvolu prefere aboni per la ĝirokonto
8392 aŭ senpere en la poŝto.

Adreso de la administrejo (abonoj kaj
anoncoj): Männikkötie 5 M 67,
MAUNULA

Redakcio: Vilho Setälä, Kaarlo Jokinen, Emil Stenholm.

Redaktejo: Esperantotie 4, MATINKYLÄ (artikoloj, novaĵoj, recenzoj, interŝanĝo de gazetoj)

Ĉiuj esperanto-organizaĵoj, kluboj kaj societoj estas varme petataj konstante kontribui per novaĵoj kaj interesaj artikoloj, proponoj ktp., por ke nia gazeto estu vera komuna informilo.

ESPERANTO EN LERNEJOJN

Nova etapo atingita en Finnlando

Tri blindaj junuloj en Helsinko decidis studi la licean kurson por ekzameniĝi kaj atingi la ateston pri matureco (abiturianta ekzamenon). Ĉar ili jam lernis esperanton tiel, ke ili povas ĝin uzi praktike, ili petis la permeson ekzameniĝi en Esperanto anstataŭ en latina lingvo. La (tutlanda) Instrua Administracio, kiu decidas pri tiaj esceptaj ŝanĝoj en la studprogramo de la lernejoj, petis per oficiala letero, ke magistro Vilho Setälä, membro de la Akademio de Esperanto, ellaboru planon por adekvata kurso, respondanta al trijara studado, po 5 lecionoj ĉiusemajne, de latino aŭ alia fremda lingvo en la ŝtataj liceoj. Ricevinte la proponon, la Administracio en sia plenkunsido la 28-an de oktobro 1959 aprobis la studplanon laŭ tiu propono kaj konsentis je la peto de la junuloj, sub la kondiĉo ke la ekzamenon efektiviĝu instruisto de Esperanto, aprobita de la Akademio de Esperanto.

Ĉi tiu decido signifas precedencon, kiu ebligas similan ekzameniĝon por aliaj personoj. Tamen, nepra kondiĉo

por la efektiviĝo de tia permeso estas, ke la rektoro de tiu lernejo, kie la lernanto estos ekzamenata por la matureca atesto, mem peticiu la aranĝon aŭ subtenu la peticion de la lernanto(j).

Ni devas kun dankemo noti, ke la rektoro en tiu lernejo, kie la nomitaj junuloj ekzameniĝos (kiel t.n. privataj studantoj, t.e. sen partopreno en la regulaj lecionoj), sro Kauko Salmenkallio, favore subtenis la peticion de la junuloj.

La studplano enhavas elementan lernolibron de Esperanto, facilajn legolibrojn, bazan gramatikon, iniciadon de korespondo kun eksterlandanoj, la verkojn de dro Privat, Vivo de Zamenhof kaj Historio de Esperanto, kaj plurajn verkojn literaturajn, tradukojn kaj originale esperantajjn. Por la blinduloj estas krom tio inkludita biografioj de Louis Braille kaj Harald Thilander. Krom tio la kurso entenos skribajn ekzercojn sur la bazo de la studitaj verkoj.

V. S.

Babilo de Lilo

JUBILEA NUMERO DE »ESPERANTO«

En la revuo de UEA veteranoj de la movado rakontas »kiel mi fariĝis esperantisto«. Estas plaĉe legi tiajn rakontojn de homoj, kiuj »de siaj junaj jaroj ĝis grizaj haroj» fidele agis por la ideo.

Ankaŭ en nia lando ankoraŭ vivas esperantistoj, kiuj aliĝis al la movado jam antaŭ la unua mondmilito. Ilin oni plenrajte povas nomi veteranoj. Estus interese legi en nia gazeto iliajn rakontojn pri tiu tempo, kiam ili fariĝis esperantistoj — do: kiam, kiel kaj kial? En jarkunveno de EAF Vilho Setälä parolis pri sia renkonto kun Esperanto — renkonto, kiu fariĝis daŭra ligo kaj obstina laboro por la afero. Eble li kiel unua ripetos sian rakoton pri tiu renkonto. Sed ankaŭ la ceteraj estimataj veteranoj: revoku en via menso rememoron de tiu tempo en via juna aĝo, kiam vi konatiĝis kun la internacia lingvo. Mallonge rakontu al ni, kiel tio okazis, kial vi fariĝis esperantisto kaj kion Esperanto donis kaj donas al vi. »Aktuala» temo nun dum la jubilea Zamenhof-jaro.

* * *

INTERMETO: La redakcio plene aprobas la proponon de Lilo, kvankam ni ne plu povas promesi pri la publikigo antaŭ la fino de la Z-jaro. Sed Vilho Setälä diras, ke unue sendu siajn memoraĵojn la pli veteranaj samideanoj inĝ. Sulo Anttila, insp. E. A. Sovijärvi prep. Yrjö Nummi kaj staciestro H. Salokannel! Ni ne scias, ĉu ekzistas ankoraŭ aliaj, kiuj esperantiĝis antaŭ 1906, sed se estas, ili volu sin anonci!

* * *

Mi atentigas svamideanojn pri ebleco ricevi senpagan legajon kaj ekspozician materialon. Multaj urboj kaj turismaj asocioj eldonas gvidlibretojn kaj ilustritajn faldfoliojn, kiujn ili senkoste disdonas. En Esperanta Finnlando estas antaŭnelonge anoncitaj du belaj ekzemploj, la grandioza »Faktoj pri Germanujo» (Kiam aperos simila pri Finnlando?) kaj la pli

La decembra numero de Esperanto fariĝos elstara jubilea numero. Ĝi havos alian aspekton kaj pli grandan amplekson, enhavos speciale elektitan kolekton da altkvalitaj artikoloj, riĉan foto-materialon, inter kio troviĝos tute ne konataj fotoj el la vivo de Zamenhof, kaj entute tiu numero estos eksterordinare grava kaj posedinda por ĉiu vera esperantisto.

La jubilea numero aperos jam meze de novembro, por ke oni povu uzi ĝian materialon en la tuta mondo por la decembraj celebradoj.

Krom la membro-abonantoj 1959 ĝin ricevos ankaŭ ĉiuj novaj MA 1960, kies kotizoj atingos la centran oficejon antaŭ la 1-a de decembro ĉi-jare.

Tial ni varme rekomendas al ĉiuj finnaj esperantistoj aliĝi (kaj realiĝi) kiel eble plej baldaŭ kiel MA al UEA. Estas ja nia devo montri, ke la Z-jaro ne pasis dum dormado sed dum vigla agado ankaŭ en nia lando. Do, ĉiu leganto aliĝu tuj kaj instigu siajn amikojn aliĝi.

Vi ja scias, ke la aliĝojn (kotizo de MA 1200 mk) akceptas la ĉefdelegito, rektoro Joel Vilkki en Somero, poŝta ĝirokonto Tu 60253.

Muistakaa, että Brysselin kongressin liittymismaksut kallistuvat vuoden vaihteessa. Pyytää liitymislomake (10 mk). Matka edestakaisin Turku—Bryssel—Turku maksaa n. 25.000 mk ynnä makuuvuonuliput n. 4000 mk. Seuramatkana tulee se muutamaa tuhatta halvemmaksi.

modesta gvidlibro pri Ravenna. Estas grave, ke kiom eble plej multaj esperantistoj petu tiajn broŝurojn. Ofte la lokaj samideanoj devis multe penadi por aperigi la libereton aŭ folion. Se ne troviĝas sufiĉe multaj petantoj, la aŭtoritatuloj plu ne estas interesataj pri esperanta turisma propagando. Plue, tiaj propagandiloj ofte estas belaj geografiaj instruiloj.

Lilo.

Sen festvesto

El la verko »Mustapartainen mies herättää pahennusta» (Nigrabarbulo kaūzas skandalon), 1921

Tiu ĉi estas rakonteto pri malaltstatura rondokula viro en la vestiblo de festotagmanĝo.

Ekzistis la hotelo-restoracio »Societejo», kiun ĉirkaŭis la urbo kiel ordinare.

Iu el la komunutilaj publikaj civitanoj de la urbo vivis kontinue 75 jarojn — spite ke la urbo havis ne nur porhigienan komitaton sed ankaŭ kuracistaron. Ĉar li ne mortis juna, oni aranĝis konsole al li solenan civitanan festotagmanĝon (obs. kun festvesto), kiu laŭ la sekvontatagaj gazetreferatoj restigos al la ĉeestintoj neforgeseblan rememoron. Kotizo por la partopreno 50 markoj.

En la grandan »Fjalar-salonon» de la restoracio (la nomo devenas de tio, ke Fjalar neniam ĉeestis tie) ĉirkaŭ la tablojn — elegante per blankaj tukoj bonguste ornamitajn — kolektiĝis kun siaj virinoj konsiderinda reprezentantaro el la rondoj de la scienco kaj arto, de la societa vivo, komerco kaj industrio, same tiuj de la libervola fajrobrigado kaj la gazetaro.

En la aero ŝvebadis odoro de la proksimiĝonta rostajo.

La du plej spertaj, kompetentaj pordistoj de la hotelo-restoracio deĵoris en la vestiblo. Ili bone konis ĉiujn fajnajn kutimojn de la mondo kaj komprenis ĉiujn lingvojn — krom la finnan. Tio ĉi nome okazis en Finnlando.

Malgraŭ la homamaso la pordistoj viglamente kaj ĝentile demetis la supervestojn de la gastoj kaj pendigis ilin sur najlojn tiel ordigite, ke plej facile troviĝu la vestoj de la plej alta trinkmono.

— Prenu do ankaŭ mian palton, diris malalta rondokula viro.

— Tuj tuj, diris la pordisto tamen unue dehelpante la imitizetan *) pelton de junulo ĵus alveninta.

Pos tio la pordisto iom post iom kliniĝis atenti la palton de la malalta rondokululo taksante ĝian trinkmonan valoron je 50 pennoj aŭ neniom.

— Ho, ĉielo, ekdiris la pordisto fremdlingve kaj paliĝis, — sinjoro ja ne havas veston!

— Mi havas. Krome ĉu ne sufiĉas, ke vi prenu nur la palton?

— Sed sinjoro ja havas grizan veston! Tie ĉi oni devas esti festvestite. Ĉiuj havas festveston.

— Eniru en tiu vesto, kiun vi surhavas, diris la junulo de la imitizeta pelto, — vi verŝajne sonĝas nun. Ankaŭ mi iam sonĝas havi laborveston tie, kie oni devus esti festvestite. Sed ĝenerale oni elvekiĝas ĝuste kiam la situacio pleje embarasas. Eble ankaŭ vi vekigo post la eniro. Hah, hah.

— Ĉu vi opinias, diris la malalta rondokululo al la pordisto, ke prefere mi ne eniru?

— Ĉar sinjoro havas tiun veston, mi konsilus, ke sinjoro ne eniru. Tio estus skandalo. Mi devas preskaŭ malpermesi al sinjoro la eniron. Tie ĉeestas societo, ĉiuj festvestitaj.

— Ĉu tie sin trovas la sinjorino de la komerca konsilanto?

— Jes, jes. La tuta altrangularo. Ĉiuj frake kaj dekolte kaj tiel plu.

— Ĉu tie estiĝos multaj festparoladoj?

— Kompreneble, jes!

— Bonvolu redoni mian palton. Pro kio malbenita mi eniru tien!

Sed en la salono, malgraŭ bruo de interparolo, regis peza, obseda, preskaŭ melankolia atmosfero.

Parton de la publiko ĉe la tagmanĝo obsedis kaj malĝojigis scio pri la devo fari al la honorgasto longan paroladon. La ceteran parton timigis la malĝojiga scio, ke ili devos aŭskulti tiujn longajn paroladojn.

La sola gaja kaj kontenta homo estis la 75-jara honorgasto de la festotagmanĝo. Li obeis al la pordisto: »mi konsilus, ke sinjoro ne eniru».

Li forrapidis el la tuta urbo. Steloj brilis surĉiele kaj la koniferoj bonodoris, neĝo reflektis kristalbrile, kaj la malaltstatura, rondokula 75-jarulo sentis sin 70 jarojn pli juna.

Trad. Vilho Salonen

*) Zibeto: peltbesto ratsimila, vivanta en akvo (fiber zibethicus).

VALTIONAPUA ESPERANTOKERHOILLE

Suomen Esperantoliitto on sopinut Opintotoiminnan Keskusliiton kanssa valtionavun saamisesta esperantokerhoille. Tosin valtionapu on tätä nykyä vähäinen, 1.000 mk kerhoa kohti, mutta on toiveita, että se hyvin pian nousee huomattavasti. Sen vuoksi kehoitamme kaikkia esperantokerhoja jo nyt liittymään mukaan tähän toimintaan.

Saadakseen valtionavun kauttamme on kerhon liityttävä Suomen Esperantoliiton jäsenkerhoksi. Liitto on täysin puolueeton. eikä aja mitään poliittisia tm. päämääriä esperanton edistämiseen kytkettynä.

Kerhon ei tarvitse järjestäytyä yhdistyslain mukaisesti; riittää, kun se omaksuu itselleen Opintotoiminnan Keskusliiton mallin mukaiset säännöt. Mikäli kerho ei kas-

Esperantosta ja kansainvälisestä kielestä

Kolme, neljäsataa vuotta takaperin oli kaikilla Euroopan oppineilla yhteinen kirja- ja puhekieli, latina. Edellytyksenä siihen oli, että latinankieltä pönkitettiin koulupoikien päähän monta vuotta peräkkäin. Menneellä vuosisadalla lausuttiin monilta tahoilta katkeria sanoja latinan herruudesta. Tämä herruus on loppunut kaikkialla paitsi roomalaiskatolisen kirkon pappienemmistön keskuudessa. Sensijaan olemme saaneet monikielisuuden sietämättömän kantamuksen hartioillemme. Nykyajan tiedemiehen on pakko oppia englantia, saksaa ja ranskaa seuratakseen tieteen nopeata kehitystä. Historian tutkijat, kirjallisuuden tutkijat, biologit, apteekkarit ja lääkärit tarvitsevat vähän latinaa. Matematiikan, fysiikan, kemian ja tekniikan alalla venäjänkielen taito on nyttemmin hyvin suotava, jopa tarpeen vaatima. Muutamissa tieteenhaaroissa viljellään italiankieltä, espanjaa, japaninkieltä, skandinaavian kieltä, tšekinkieltä, suomea. Kätevisiä kääntäjistä on huutava puute, eikä kumma kun otetaan huomioon, että tieteellisen teoksen kääntäjältä vaaditaan vähän asiantuntemustakin. Käännöskoneet

va varsinaiseksi yhdistykseksi, joka haluaa tällaiselle kuuluvia laillisia oikeuksia, voi kerho edelleen pysyä tällä pohjalla.

Kerho maksaa jäsenmaksua Suomen Esperantoliitolle 100 mk jäsentä kohti (mistä suoritetaan UEA:lle jäsenmaksu), ja sen jäsenet ovat oikeutetut käyttämään hyväksyen UEA:n palveluksia.

Kerhon on lähetettävä meille täytetyt ilmoituslomakkeet viimeistään 15 p:nä marraskuuta. Lomakkeen lähetämme kerholle heti pyynnön saatuamme.

Valtionapuna saa tilata esperantokirjoja valintansa mukaan. Kotimaisista kirjoista tulee 10 % alennus. Erikoisesti huomautamme, että uusi oppikirja Valtatie kielitaitoon (ynnä 1 v. EF), kirjakauppahinta 600 mk, saadaan tilata kerhon jäsenille hintaan 400 mk — 10 % = 360 mk/kpl (+ postikulut), jolloin lehti Esperanta Finnlando lähetetään vain yhtenä kappaleena kerholle, ilman eri maksua.

Valtionavun saannin ehtona on:

1. Kerhoon kuuluu vähintään 5 jäsentä, jotka ovat täyttäneet 16 v.
2. Kerholla tulee olla opinto-ohjaaja. Sellaiseksi hyväksytään joku kerhon

Professori Björn Collinderin puhe Zamenhofin 100-vuotismuistojuhlassa Helsingin Yliopiston pienessä juhlasalissa 20. 9. 1959. (Kirjoitettu ääninauhasta).

ovat tulevaisuuden musiikkia, mutta jättäkäämme tiedemiehet oman onnensa nojaan ja katsokaamme monikielisuuden puolta toiselta näkökulmalta. Vielä tämän vuosisadan alussa oli ranskankieli valtiomiesten ja diplomaattien kansainvälinen kieli ja virallisessa kanssakäymisessä vieraiden valtioiden edustajien kanssa ranskankielen taito oli miltei välttämätön. Kun Ahvenanmaan kysymystä käsiteltiin Genevessä vuonna 1920 Suomen edustaja Enckel veti kielitaidollaan kuuntelijat puoleensa, kun sitävastoin Ruotsin edustaja Hjalmar Brantig, kuuluisa kaunopuhuja kotimaassaan, puhui ranskaa niin huonosti ettei kukaan viitsinyt kuunnella.

Ensimmäisen maailmansodan aikana englanninkieli sai aseman valtiomiesten toisena keskustelukielenä ranskankielen rinnalla, ja siitä asti meillä on kaksi diplomaattikieltä. Sen, joka ei osaa kumpakaan kieltä, täytyy turvautua tulkkiin. Ne jotka hallitsevat täydellisesti joko englannin tai ranskankielen ovat kansainvälisissä sanakiistoissa niin etuoikeutetussa asemassa, etteivät muut riitapuolet voi pitää puoliaan. Kun ranskan valta heikkeni

jäsen, joka suostuu ohjaamaan muita.

3. Kerhon on pidettävä vähintään 12 opintokokousta aikana 1. 9—31. 5.
4. Esperanton opiskeluksi luetaan
 - a) alkeisopinnot,
 - b) jatko-opinnot tai kirjallisuuden lukeminen yhteisesti,
 - c) vapaa keskustelu esperantokielellä.
5. Kerhon on lähetettävä toimintakertomuksensa 15. toukokuuta mennessä.

Kerholle, joka sitä pyytää, lähetämme lainaksi pelkkiä postimaksuja (50 mk) vastaan ääninauhan, jossa on malliääntäminen (miehen ja naisen ääni). Nauhaa voi kuunnella magnetofonilla, jonka nopeus on 95 mm/sek ja joka käyttää ääninauhan yläreunaa kulkiessaan vasemmalta oikealle. Eri pyynnöstä voidaan valmistaa nauha muullaistakin magnetofonia varten.

Kerholla on oikeus osallistua Suomen Esperantoliiton vuosikokouksiin.

ESPERANTO-ASOCIO DE FINNLANDO

prezidanto: Vilho Setälä

Esperantotie 4, MATINKYLÄ

sekretario-kasisto: Irja Sivula

Siilitie 11 b A HERTTONIEMI
(Helsinki)

heikkenemistään, seurasi diplomaattisella näyttämöllä kaksikielisyyttä monikielisyyttä. Kun ranskalaiset saavat käyttää omaa kieltään, miksei olisi venäläisillä ja kiinalaisilla samaa oikeutta. Niin syntyi nykyinen tulkitsemisjärjestelmä. Se tietää käytännössä, että suurvaltojen edustajat saavat konferensseissa käyttää hyväkseen kielentaitouden kaikkia voimalähteitä, kun sitä vastoin monen pienen tai keskikokoisen valtion edustajat olosuhteiden pakosta pahasti änkyttäen esittävät ajatuksensa kankealla ja vaillinaisella taidolla. Naurettavalla englannin tai ranskan kielellä, voimatta vastata vastaväittäjän sukkeluuksiin.

Mantieteellisesti maailman kansat tulevat yhä lähemmäksi toisiaan sitä mukaa kuin kulkuyhteydet ja nopeudet kasvavat. Henkisesti kansat pikemminkin eristyvät ja vieraantuvat toisistaan. Tämä on edistysmielisen aikakauden katkera pettymys ja tämä tietää pahaa oiretta ihmiskunnan tulevaisuuteen nähden. Jos olisi olemassa kaikille kansoille yhteinen ilmaisuväline, jokaisen ihmisen toinen puhe- ja kirjakieli, niin tämä valtavasti edistäisi keskinäistä tutustumista ja vahvistaisi eri kansallisuuksien yhteenkuuluvaisuuden tunnetta. Yleismaailmallisesta apukielestä tulisi ehdottomasti maailmanrauhan suojamuuri. Pienille kansoille on apukieli-probleemi erityisen tärkeä. Omien hengentuotteiden tunnetuksi tekeminen on niille kunnia-asia ja se on myös niiden aineeellisten etujen sanelema. Suomalaisille on Kalevala arvaamaton henkinen pääoma. Kaikkiällä, missä sitä luetaan, se herättää myönteistä mielenkiintoa Suomea kohtaan. Se mies, joka on äskettäin kääntänyt Kalevalan esperantokielelle on tehnyt kansalleen suuren palveluksen. Niin pian kun tämä käännös ilmestyy se tulee löytämään lukijoita kaikissa sivistysmaissa, missä sitä ei vielä välittömästi tunneta. Minä rohkenen ennustaa, että yksi ja toinen sen käännöksen lukijoista tulee innostumaan siitä siinä määrin, että hän oppii suomea, ryhtyy kääntämään Kalevalaa omalle äidinkielelleen.

Olen nyt näyttänyt toteen, että yleismaailmallinen ilmaisuväline, kansainvälinen apukieli, on tarpeellinen, jopa välttämätön. Seuraa toinen kysymys. Mistä saamme tämän kalliin aarteen? Minkälainen tämän apukielen on oltava? Neljätoista vuotta sitten rouva Elina Roosevelt ilmoitti, että hän tulisi tekemään voitavansa että Yhdistyneet kansakunnat omaksuisivat kansainvälisen kielen. Sen johdosta minä lähetin hänelle sähkösanoman puoltaen esperantoa. Rouva Roosevelt vastasi, että hän oli lähinnä ajatellut englanninkieltä. Pormestari Karl Lindhagen kerran puhui eräälle ranskalaiselle diplomaatille kansainvälisen kielen aatteesta. Ranskalainen heti innostui ja

sanoi: »Tämä on suurenmoista. Tästä lähtien tulen omistamaan elämäni tämän aatteen palvelukseen. Tulevaisuuden maailmankieli on tietysti ranskankieli. Kun pormestari Lindhagen sanoi, että ranskankieli on ehkä liian vaikea ruotsalaisille työmiehille, silloin ranskalainen vastasi, että miksi ruotsalaiset työmiehet oppisivat ranskankieltä.

Englanninkieli on levinneisyyteen nähden erikoisasemassa kielten keskuudessa. Enemmän kuin 200 miljoonaa ihmistä puhuu sitä äidinkielenään ja se kuuluu keskikoulujen oppiaineisiin kaikissa sivistysmaissa. Se on merenkulun, ilmailun ja hotellien maailmankieli. Ehkä englanninkieli on se yleismaailmallinen ilmaisuväline jota ihmiskunta kaipaa? Englanninkielen puoltajia sopii muistuttaa siitä, että se, joka todistaa liian paljon ei todista mitään. He useasti vetoavat siihen, että englanninkieli on helppo oppia. Minulla on päivastainen kokemus. Minä olen lukenut englantia 40 vuotta, toiminut yliopiston opettajana Yhdysvalloissa yhden vuoden ja kirjoittanut viisi kirjaa englanninkielellä, mutta siitä huolimatta en tullut toimeen eräiden tieteellisten artikkelien kanssa. Ja joskus ei Websterin sanakirjakaan voinut antaa häitäpua, vaikka siinä on kuusisataatuhatta hakusanaa, mokoma maailmankieli. Englanninkieli on tietenkin kansainvälisenä ilmaisuvälineenä tehnyt ja on tulevaisuudessaakin tekevä ihmiskunnalle arvaamattomia palveluksia, mutta me olemme silti kaukana maailman kielipulman ratkaisusta. Jos englanninkielestä tulisi joka ihmisen toinen kieli, sillä varauksella, että englanninkieliset kansat pääsisivät oppimasta yhtään vierasta kieltä, niin tämä tuottaisi heille huimaavan suurta etua. Ovatko kaikki muut suuret kansakunnat taipuvaiset myöntämään heille sen edun omalla kustannuksellaan? Voidaanko edes ajatella sellaista olotilaa, että ne alistuisivat siihen? Jos vedotaan siihen, että ranskankieli toimi kaksisataa vuotta sitten kansainvälisenä kielenä, niin on vastattava, että nykyiset olosuhteet eivät ole verrattavissa silloisiin. Siihen aikaan kansainvälinen seurustelu oli ylimystön käsissä ja sen ylimystön lapset oppivat ranskaa kotonaan, ranskaa puhuvien kotiopettajatarten ja lastenneitien avulla. Samoin oli 50 vuotta sitten niiden venäläisten laita, joita meillä ja muualla Euroopassa pidettiin aihettomasti kielineroina. Nykyään julkisen elämän ohjaket ovat tavallisten miesten käsissä ja tällä kansanvaltaisella aikakaudella kansainvälisen kielen täytyy tyydyttää joka miehen tarpeet, ei ainoastaan pienen valiojoukon. Englanninkielen kannattajat vetoavat siihen, että englanninkieli on muka hyvin helppo oppia.

Jatkuu seuraavassa numerossa.

PUOLUEETTOMIA ESPERANTO-KERHOJA JA OPINTOKERHOJA PERUSTAMAAN

Maamme puolueeton esperantoliike on ollut viime vuosina heikosti organisoitua. Kehoitamme nyt Zamenhofvuoden puitteissa perustamaan Suomen Esperantoliittoon liittyviä paikalliskerhoja ja näitä ilmoittautumaan liiton sihteerille, neiti Irja Siivulalle osoitteella Siilitie 11 b A, HERTTONIEMI (Helsinki). Jäsenmaksu, johon sisältyy UEA:n jäsenyys (ryhmäjäsenenä), on 100 mk vuodessa jäsentä kohti (nyt liittyvät suorittavat vain vuoden 1960 jäsenmaksun).

Kaikki kerhot voivat helposti järjestää toimintansa niin, että saavat valtionapua. Sitä varten on vain järjestetävä yksi tai useampi opiskeluryhmä (ks. kirjoitusta VALTION-APUA!).

INTERNACIA MOVADO

Sudazia Bulteno estas nova presita gazeteto esperanta-angla. Ĝi donas novaĵojn pri Indonezio, Cejlono kaj Hindio. Ĝi

promesas publikigi korespondajn anoncojn, sed je tre alta kosto (1 RK por ĉiu vorto).

EI KOREUJO ni ricevis longas presitan cirkuleron, kiu montras ke nia movado tie multe progresis, precipe en la Chunggu Universitato, kie laboras sro Heng Wi Hong, kiu elektis kiel temon de disertacio »La studo pri la lingvo-ideo de Zamenhof». Li informas, ke la prezidanto de tiu universitato, s-ro H. C. Choi alveturos al Eŭropo. Li estas malnova samideano kaj rekomendata al la eŭropa samineanaro. Bedaŭrinde ni ne ricevis informon pri lia ebla alveturo al Finnlando.

FINNLANDO — SUOMIO

S-ano Väinö Santamo pledas por Finnlando (per unu n) kaj prave atentigas, ke la pledantoj por Suomio fakte proponas du novajn radikojn (suom' kaj suomi'), sed malatentas tion, ke ni bezonas ankaŭ la nomon de **finno** (almenaŭ por povi diri, ke ekzistas du Finnlandaj lingvoj, finna kaj sveda). Li avertas kontraŭ ŝanĝo de la kreaĵo de Zamenhof. Al tio ni rimarkigas, ke la Z-a uzado estas malfacile trastudebla, sed ni povis konstati, ke la nomo de nia lando estas skribita per **duobla n** almenaŭ en la 'Ekzercoj de Aplikado' (unua eldono ŝajne en 1900, en Kolekto Aprobata de Z) kaj en la letero de Z al Margarete Noll la 29-an de aŭgusto 1914. Alian uzojn de la nomo de nia lando ni ne trovis.

L a R e d.

LA 12-A FERVOJISTA ESPERANTO KONGRESO

Helsinki (Finnlando) 11—16 de junio 1960.

Adreso: Helsinginkatu 6. B. 50. Helsinki — Finnlando.

Bankkonto: 60264 P.Y.P. Pohjois-Haaga, Helsinki — Finnlando.

Informilo 2.

Honora prezidanto:

Erkki Aalto, Ĉefdirektoro de la ŝtataj Fervojoj (V.R.)

Honorkomitato:

R. H. Oittinen, Ĉefdirektoro de lerneja supera administracio, J. T. Kivistö, Helpurbestro de Helsinki, J. Lennes, Vicdirektoro de V. R. Prezidanto de la finna sekcio de Fisaik, Y. Ollilainen, Ĉefo de sociala servo de V. R., M. Voltti, direktoro de Fervoja Instituto, Y. Kallinen, Instrua Konsilisto, Prezidanto de Laborista Kleriga Ligo.

Bonvolu anonci vin kiel eble plej baldaŭ. Se vi faros tion antaŭ la 1-a de marto, via kotizo estas 300 fmk malpli.

KONGRESPROGRAMO:

(La LKK rezervas la rajton ŝanĝi la programon.)

Sabato	11—6:	8 h	Malfermo de la kongresejo
		20 h	Interkonatiga vespero
Dimanĉo	12—6:	10 h	Solena malfermo de la kongreso
		13 h	Fotografado
			Urba rondveturado
		15 h	Libera vespero
Lundo	13—6:	9.30 h	Redaktora kunveno
		15 h	Terminara kunveno
		20 h	Kultura vespero
Mardo	14—6:	9.30 h	Estrar- kaj delegitara kunveno
		15 h	Fakprelegoj
		20 h	Filmvespero
Merkredo	15—6:	9.30 h	Laborkunsido
		14 h	Laborkunsido 2
		19 h	Kongresbalo
Ĵaŭdo	16—6:	7—22 h	Tuttaga ekskurso (Arĝenta linio)

Atentu! Pluaj informoj sekvos en la venonta Internacia Fervojisto.

L. K. K.

JUBILEOJ

70 jara estos la 12-an de decembro la kozeristo **Väinö Nuorteva** (pseŭdonime: **Olli**), kies kozeriojn ni ofte legis ankaŭ en esperantaj revuoj (Norda Prismo kaj EF). Finnoj plej ofte trovas — ĉiutage ni povas diri — lian kozerion en Uusi Suomi, la tagjurnalo. Ofte ili estas politikaj satiroj sed same ofte li vipas diversajn ĉiutagajn malsaĝaĵojn de oficistoj, biokratismo kaj ordinaraj civitanoj. Ĉi tie ni volas sincere gratuli lin ĉefe, ĉar li montris intereson al nia lingvo kaj afable permesis tradukon de siaj kozerioj al Esperanto, sen ia limigo. Pri »Norda Prismo» li skribis: »Nur malmulton mi povis diveni el ĝia enhavo, sed ĝi aspektas interesa, same la graveco de internacia lingvo entute; ŝajnas, ke mi eble devos ankoraŭ je la alta aĝo komenci studi Esperanton.»

50 jaroj pasis de la naskiĝo de doktoro **Erkki Kääriäinen** la 30-an de oktobro. Profesie li estas astronoma geodezo, kaj li specialiĝis je la problemo de la plialtiĝo de Finnlanda tereno, pri kio li verkis i.a. por Scienca Revuo. Esperantisto li estas de la lernejoj jaroj, kaj li aktivis kiel estrarano de Esperanto-Instituto de Finnlando.

GEOGRAFIAJ SEMAJNOJ

Unua geografia semajno de la Internacia Geografia Asocio (esperantista) okazis en Rovinj, sur la jugoslavia bordo de Adria maro. El la programo ni notas prelegojn pri esplorvojaĝoj fare de lic. Tibor Sekelj, al 300 personoj, inter kiuj ankaŭ multaj neesperantistoj el la vizitantoj de la nomita banurbo, kaj konatiĝo kun submara esplorado. La semajno kunvenigis krom fakuloj multajn esperantistojn, interesatajn pri vojaĝado, esplorado kaj agrabla somerumado. Dua semajno simila okazos post la Brusela univ. kongreso, pri kio la interesiĝantoj povas informiĝi ĉe la sekretario, f-ino Maria Mirković, Djakovića 22, RIJEKA, Jugoslavio.

KLUBA VIVO

LEK, Helsinki, Klubkunveno 23. 11 je la 19:a horo en Laborista domo, ĉambro N:o 23. Prelegos Martti Turpeinen pri »Nia agado en la spegulo de nuna tempo». Kolorfilmo pri somera Finnlando — Paavo Kivi. La tradicia abia festo okazos 6. 12. en A-salono de Lab. domo. — Personoj, kiuj estas interesitaj pri popoldancoj aŭ teatraĵoj, volu kontaktiĝi kun la sekretario, tel. 414599. Kantemaj personoj, informu vin al M. Turpeinen, kantkoruso fondota. En decembro aperos nia nova membrokatalogo, volu informi ŝanĝiĝintajn adresojn al la sekretario.

KORESPONDO DEZIRATA.

GREKUJO:

S-ino Athinâ K. Zahariadou-Burka, profesoro de ŝtata gimnazio. Odôs Trâl-leon 93, ATHINE (Ano Patissia), Hellas.

F-ino Eleni K. Papagrigoraki, 16-jara lernantino, Odôs Ypsilantou 24, ATHINE (Perissôs), Hellas.

F-ino Iaanna A. Tsonopolou, 16-jara lernantino, Odôs Dabaki 19, ATHINE (Nea Filadelfia), Hellas.

S-ro Panajotis I. Desalermos, 22-jara ĵurnalista, Odôs Prokopioi Ikoniou 54, ATHINE (10), Hellas.

F-ino Anna-Maria Mihalitsiânou, 23-jara studentino, Odôs I. Blabianou 2, ATHINE, (Patissia), Hellas.

S-ino Maria M. Kardamitsi, 35-jara Odôs Aharnôn 292, ATHINE, Hellas.

S-ro Theodoros D. Samakoblis, 16-jara lernanto, Odôs Sinopsis 12, ATHINE (Nea Filadelfia), Hellas.

F-ino Sousô E. Messari, 22-jara studentino, Odôs Kipselis 60, ATHINE (Kipseli), Hellas.

S-ro Petro A. Malteros, 18-jara lernanto, Odôs Lenorman 138, ATHINE (Kolonôs), Hellas.

S-ro Dimitrios H. Margetis, pensiumita vicadmiralo, Odôs F. Negri & Drosopoulou 71, ATHINE (Kipseli), Hellas.

ĈEĤOSLOVAKIO:

S-ro Zdeno Mikulecky, Repov 98, MLADA BOLESĤAV. (18 jara junulo)

František Dvorák, Albrechtice u/vet. 88, Ĉeĥoslovakio. 15-jara ĉeĥa lernanto, PM, PK.

Filatelisto deziras kontakton kun bonaj filatelistoj: Václav Bubňák, žst Dolní Berkovice, okr. Mělník.

Arkitekto ipk. Jan Kalny, Do Lesek 26, ZNOJMO.

GERMANUJO:

Erhard W. Matthes, Sandgewann 10, MANNHEIM 1. PM, PK, div. temoj.

Junaj ge-germanoj ĉe Johannes Radam, Ostroder Weg 4, MANNHEIM-Schönau.

ESTONOJ:

Junuloj ĉe L. Tangsoo, Männiku 14, TORVA, Eesti SSR.

JUGOSLAVIO:

60 gejunuloj inter 12—18 j. Esperanto-societo, Vinkoviĉeva 2, BJELOVAR.

HISPANIO

Koresp. pri div. temoj kaj iŝ. ipk s-ro A. Martinez Gonzala, Santo Tomás 74, CASTELLON.

HUNGARIO

Pri vivo kaj kulturo en Finnlando 74-j. vidvo, kol. alumed- kaj raziletikedojn, ipk. pm. Zoltan Gálfy, Szabadkégyós, BÉKÉS m.

Kaikkien kirjoitustemme käyttö on vapaa

Tämä yhteinen tiedotusvälineemme ilmestyy ensi vuonna entiseen tapaan, 9 numeroa vuodessa. Tilausmaksu on kotimaassa entinen 300 mk vuosikerta. Ulkomaan tilaushintaa on postimaksun kallistumisen vuoksi täytynyt hieman korottaa. Ulkomaille tilaus maksaa 450 mk.

Tilaukset voi suorittaa postisiirtotiliä 8392 käyttäen tai lähimmässä postitoimipaikassa. Tilauksia otetaan jo nyt vastaan. Kiiruhtakaa tekemään tilauksenne ennen vuodenvaihteen kiireitä.

Lehtemme on ainoa esperantolehti, joka leviää laajalle maassamme siten pitäen yhteyttä hajallaan asuviin kielten harrastajiin. Lisäksi lehti antaa tarpeellista ohjausta kieltä yksinään opiskeleville ja välittää esperantomaa- ilman uutisia. Lausumme kaikki entiset ja uudet ystävät tervetulleiksi lukijapiiriimme.

Esperanta Finnlando

HEROLDO DE ESPERANTO

Mi akceptas abonojn por »Heroldo de Esperanto», la sola internacia ĵurnalo Esperanta; ĝi havas aspekton kaj formaton de nacia taga ĵurnalo kaj staras neŭtrale super la diversaj Esperantaj organizajoj. La gazeto aperas duonmonate, en somero monate. La abono en Suomio kostas 1000 mk.

La legantoj mem elektas la manieron de pagado. Ili povas pagi aŭ nun mendante aŭ poste dum la riceva jaro, aŭ per unu fojo aŭ je partoj. Kiu volas pagi tuj, sendas la monon al mia poŝta ĝirokonto kaj indikas la mendon sur la kupono de la pagokarto. Kiu volas pagi poste aŭ je partoj, skribas al mi poŝtkarton kun indikoj pri la mendo kaj pri la dato(j), en kiu(j) li pagos. La pagado estu finita ĝis la lasta tago de venonta oktobro. Mia adreso estas »Pastro Hemmo TIETTI, LETKU», mia poŝta ĝirokonto havas la numeron 39.786.

Ekde nun ankaŭ la malnovaj abonantoj, kiuj ne pagas tuj, volu reaboni per poŝtkarto aŭ pagokupone, ĉar mi ne plu sendos al ili, kiel en antaŭaj jaroj, apartajn mendoblanketojn. La malnovaj abonantoj ankaŭ rimarku la ŝanĝon en la kontonumero, kiu perdis la ĝisnunan antaŭliteron Tu!

Mi aranĝis la formon de partopagado, por ke la legantoj havu la eblecon adopti unu samideanon en lando orienteŭropa aŭ azia. Nuntempe ekzistas pli da Esperantistoj en orientaj landoj ol ĉe ni, sed neniu el ili povas mem aboni al si eksterlandan gazeton. Subtena abono kostas 5-foje po 400 mk. Ni malfacile imagas, kiom granda donaco por tiuj homoj estas »la kontakto kun la mondo»!

Hemmo Tietti.

ELDONAĴOJ DE ESPERANTO PRESS EN OAKVILLE: KANADO

Por infanoj:

Ni legas bildojn, instrua bildolibro sen teksto por 5—8 jaruloj. 47 p. Prezo 250 mk.

Gvidilo por »Ni legas bildojn». La cele de tiuj libroj estas paroligi kaj rakontigi la infanojn, estigi kaj formi la emon al legolernado. 37 p. Prezo 150 mk.

Alko kaj Suna de Verna Hills, broŝurita 78 paĝa libro kun 22 ilustritaj rakontoj por 3—6 jaruloj, verkita laŭ eduka vidpunkto.

Tre rekomendinda pro la agrabla enhavo kaj facila stilo. Prezo 333 mk.

Aliaj libroj:

R. Eichholz, **Unitarismo — realigita homaranismo**. Broŝ. 60 p. 263 mk.

Ĉiujara murkalendaro grandformata. 210 mk.

Bulteno Gepatra, sendependa revuo por dulingva eduko. Aperas presite per kvar 24-paĝaj kajeroj jare. Redaktoro W. Brandenburg, Münster, Germanujo. Abonprezo libervola.

Vidu ankaŭ anoncon en Esperanta Finnlando n:o 5/1959, p. 40, pri aliaj porinfanaj libroj.

Peranto por Finnlando:

Sirkku Koivu

Jukolantie 3 C 19, Helsinki-Kä.

ĈIAM PORTU LA VERDAN STELON

Insignoj po 200 mk en Esperanto-libraro,

Töölöntullink. 7 A 2, Helsinki.

